



# LA FERA LUPO

Redakcia retadreso: [ds@esperanto.lt](mailto:ds@esperanto.lt); [chtaesok@hanmail.net](mailto:chtaesok@hanmail.net)  
<http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=jk>

ĈIUTAGA INFORMILO DE TUTMONDA KONGRESO DE ESPERANTISTOJ-JURNALISTOJ N-RO 4 | 2008 05 30, vendredo

## KONGRESLABOROJ EN LA PARLAMENTEJO



La parlamenta prezidanto Ĉeslovas Jurŝenas salutas nian kongreson.

Niaj kongreslaboroj hieraŭ okazis en la historia loko, la litova parlamentejo. Ĝia Konstituta Salono estas plena de litovaj kuraĝoj por la sendependiĝo. Tio influu al nia esperantista ĵurnalista movado.

La parlamenta prezidanto, Ĉeslovas Jurŝenas, mem estinta ĵurnalista, emfazis, ke ni estas egalrajtaj antaŭ Dio kaj antaŭ ĵurnalistoj. Post liaj varmaj salutvortoj sekvis tiom da prelegoj, ke Gian Carlo Figliera deklaris novan rekordon.

Espereble iuj ĉeestintoj raportos pri siaj aŭ alies prelegoj.



Ĉu ni iom levis (rektigis) la Esperanto-ĵurnalismon?

## Gazetaro vaste informis

Litovaj amaskomunikiloj vaste informis pri nia kongreso. Jam ĵurnaloj kaj lokaj kaj tutlandaj plurfoje aperigis artikolojn pri la kongreso kaj ĝenerale pri la Esperanto-movado en Litovio kaj en la mondo. Ankaŭ ne mankis tia informado ĉe radioj kaj televido, kiuj elsendis pri la kongreso kaj Esperanto.

## Litova Ĵurnalista Asocio

Humphrey Tonkin dum la gazetara konferenco de la kongreso diris: “Esperanto estas kreita por komunikigi homojn kun malsamaj lingvoj. Ĵurnalistoj estas profesiaj komunikantoj. Do ankaŭ ĵurnalistoj estas ege gravaj en la Esperanto-movado.” La kunorganizanto de nia kongreso, Litova Ĵurnalista Asocio konstante informas la kongreson kaj Esperanton en sia retejo. Certe tio plialtigas reputacion de Esperanto en Litovio.

## Plej populara retgazeto DELFI.LT

La plej populara retgazeto *delfi.lt* en Litovio aperigis artikolon pri nia kongreso kaj skribis, ke la litova ĵurnalista Audrys Antanaitis elektiĝis kiel nova prezidanto de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, kaj la alia litovo Vytautas Šilas kiel estrarano.

## Optika Karaktro-Rekono

Delonge la programo OmniPage kapablas legi tekstojn en Esperanto kaj 118 pliaj lingvoj. Ekde la versio 16.1 (Feb. 2008) estas enkonstruita vortaro por Esperanto – sekve la nombro de vortare subtenataj lingvoj kreskis ĝis 21. La novaĵo estas bazita sur vortlisto liverita de nia kliento Toon Witkam (Nederlando), kiu post plia ampleksigo havas 14.000 erojn.

Bonkvalitajn dokumentajn la programo povas rekonu sen vortaro helpo – sed ties influo ja helpas ĉe malbonkvalitaj paĝoj – ekzemple arĥivaj materialoj. Kiu jam posedas OmniPage (ekde v.14) povas peti senpage la vortaran dosieron de Stefan.macgill@nuance.com.

Stefan MacGill

## Prelego de UEA-prezidanto

La prelego de vicprezidanto de UEA, Ranieri Clerici ĉi-matene okazas kun la jena titolo: “De nediskriminacia lingvo al aŭtenta lingva homrajto”. La prelego anstataŭas tiun de Jukka Pietilainen je 09h35-10h05.

## Itala gazeto pri la kongreso de TEĴA

La itala loka gazeto “Cronaca” dediĉis sian duonpaĝon pri Esperanto kaj la kongreso de TEĴA, priskribante la



Nova estraro de TEĴA: Mariana Evlogieva, Dieter Rooke, Aleksander Korĵenkov, Audrys Antanaitis, Kalle Kniivilä, Vytautas Šilas (de maldekstre). Sukcesan laboron!!! (foto: Gintautas Stalnis)

kongrespartoprenon de la direktoro Giorgio Bronzetti. Li bone utiligis la kongreson por informi Esperanton en sia regiono. Iuj el ni jam same faris kaj faros post reveno.

## Dividu fotojn, videojn kaj impresojn

Se iuj el vi faris fotojn kaj videojn dum la kongreso kaj trovas ilin valoraj dividi, bv. sendi ilin al la redaktoro de La Fera Lupo (ds@esperanto.lt; chtaesok@hanmail.net), por ke li aperigu ilin sur la retejo de Litova Esperanto-Asocio. Bonvenas ankaŭ viaj impresoj, kiujn vi ne povis fari pro intensa kongreslaboro. La redaktoro faris la plejparton de la fotoj aperin-taj en *La Fera Lupo*. Se vi bezonas iujn fotojn, bv. skribi al li.

## Invito al sabata kunsido

Se vi – ĉeestintoj de la kongreso – restas post ĝi en Vilnius dum la sekva tago - sabato, la 31an de majo kaj interesiĝas pri la projekto [www.aktuale.info](http://www.aktuale.info), vi estas bonvenaj ĉeesti antaŭtagmeze, inter 9:30-12:30 en la laborkunsido de la kerna teamo de la projekto. La kunsido okazos en la sidejo de LEA (Litova Esperanto-Asocio), en strato „Rotundo 5“, ege proksime de la parlamentejo.

Kaze de intereso vi povas ev. antaŭe kontakti Jevgenij Gaus (jhenja@ikso.net , +370 68712219 ) kaj/aŭ Peter Baláž (peter.balaz@ikso.net aŭ +370 63879094). Baldaŭ aperos pli da informoj pri la disko ĉe hejmpaĝo: [www.esperantodvd.net](http://www.esperantodvd.net)

Rilate filmon vi povas kontakti la kreintojn ĉe [dvd@ikso.net](mailto:dvd@ikso.net)

## Kolegan( ne koleran) Saluton!

Mi, kun bedaŭrego, revenis hejmen, entrajne dum 12 horoj, de Pekino, kie mi dum la tuta semajno atendis vizon el litovia ambasadorejo, sed finfine ne sukcesis. Nun mi foliumas nian kongresan revueton *La Fera Lupo* (jam numerojn 1 kaj 2), kaj surrete sekvas la progreson kaj programojn. Mi image partoprenas en la afero, kaj elkore salutas kaj esperas grandan sukceson al tiu evento, epokfara almenaŭ en Esperantujo!

Laŭ la programo mi devis prelegi en la 27a de majo pri ĉinaj E-gazetoj en la pasintaj cent jaroj. Tamen mi perdis la ŝancon, eĉ se nia kara Povilas konsidereme promesis translokigi tiun temon al la lasta tago de la kongreso se mi finfine venus. Mi ne gajnis vizon, do, ne povas veni.

...\*

\* La forlasita parto troviĝas ĉe <http://esperanto.lt>

Sincere via PENG Zhengming, Wuhan, Ĉinio  
[trigo@126.com](mailto:trigo@126.com) kaj [www.tritiko.cn](http://www.tritiko.cn)


## Ne ekvidita Vilno

Kion vi povis ekskursante ekvidi, sed eble, ne ekvidis. Mi esperas, ke tiuj el vi, kiuj en n-ro 3 de "LS" 2007 tra legis mian artikolon "La vojo de Esperanto al Vilno" ne dubas, ke jam en la jaro 1895 Zamenhof, kun manuskripto de La Unua Libro enmane, venis al Vilno por trovi ĉi tie eldoniston. Ni postsekvu la aŭtoron de Esperanto, kiu en la jaro 1895 el Grodno per la matena trajno Varsovio-Grodno-Vilno atingis la fervojan stacidomon, kiu, cetere, ne multe ŝanĝis sian aspekton. La vojo de Zamenhof al la centro de antikva Vilno iris tra urba pordego, kiu portas la nomon Aŭroro Pordego kaj estas tutmonde konata danke al mirakla bildo de Maria, kiu estas ene de la pordego. Estas malfacile diri, ĉu Zamenhof en la urbo vizitis kelkajn eldonistojn por fine interkonsenti pri eldono de La Unua Libro. Mi insistas pri eldonisto Manes Romm.

Temas pri presejo, kiu apartenis al entrepreno, kiu ekde 1860 titoliĝis Firmao Vidvino kaj fratoj Rommoj. La firmao posedis eĉ du presejojn kaj muldejon de literoj. La pli granda presejo, presis judajn, ĉefe religiajn, librojn. La presejo, kiun estris Manes Romm dum la jaroj 1890-1901 lokiĝis sur la unua etaĝo de dektra alo de la domo ĉe ekvastiĝo de la Didžioji str., kiu nun portas n-ro 16. Nun ĉi tie rezidas ambasadoro de Svedio. La presejo presis ruse, pole, foje latine, itale, france, angle, iom hebrae kaj ĝis 1864 ankaŭ litove. Mi opinias, ke ĝuste pia judo Manes Romm konsentis okupiĝi pri eldono de La Unua Libro, sed poste, post kiam lin el Veisejaj atingis klaĉoj pri malpieco de L. Zamenhof, li rezignis la eldonadon.\*

\* La orlasita parto troviĝas ĉe <http://esperanto.lt>

### Siatempa stacidomo de Vilno



### Vytautas Šilas

Nuna loko de  
presejo de Romm



## FOTORAPORTO



"H.T. sukcesis produkti malgrandan guton."



Ĉi tiu foto ne atestas, ke nia kongreso havis interpretistojn.



"Nova rekordo de la Esperanto-movado: pli da prelegantoj ol partoprenantoj!"



Nadja Stojčeva kaj Lasto Nikov riĉigis nian kongresan programon per fotoekspozicio.

## SONAS SONAS KANKLOJ

Nun en Vilnius okazas la 36a Internacia Folkloro Festivalo "Skamba Skamba Kankliai" (Sonas Sonas Kankloj). Kanklo estas unu el la litovaj tradiciaj kordaj instrumentoj). Pro vesperaj akceptoj de litovaj instancoj, kiuj subtenas nian kongreson, vi ne povis ne ebligas aranĝi kulturalan programon. Jen estas bona okazo spekti internacian festivalon en la urbocentro.

### 30a tago:

Sereikiškių parko

12h00-22h00 bazaro de popolartaĵoj, koncertoj (el Finnlando, Norvegio, Latvio, Estonio, Slovakio, Pollando)

La festivalo daŭras ĝis la unua de junio.

Pli da informoj ĉe <http://www.etno.lt>



Fotoj: "Sonas Sonas Kankloj en 2006"